

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio. Dum la monato aŭgusto ni raportis al vi pri la laboro de UNO en Kongolando. Hodiaŭ ni ekzamenos kelkajn aspektojn de tiu Kongo-afero sur la mondevoluon.

Sed unue ni ŝatus saluti aŭskultanton el Budapeŝto, s-ron Pal Balkanyi, kiu skribis al ni sian intereson pro niaj elsendtemoj kaj inter ili pri la temo Kongo. Por ni, radio-prelegistoj, ĉiam agrablas scii, ke niajn mesaĝojn atentemaj aŭskultantoj kaptas regule. Se ili deziras esprimi sian vidpunkton koncerne niajn dirojn, ili ne timu skribi mesaĝojn, kiujn ni volonte legos por ĉiuj aŭskultantoj.

Post la dua mondmilito oni provis, per fondo de nova kaj plibonigita Ligo de Nacioj, malebligi militon sur la Tero. Tiu deziro pri paco estas esprimita en la Ĉarto de UN. Montriĝis poste, ke UN ne estis sufiĉe potenca por efektiviĝi la esperojn pri paco. Oni tiam iom post iom kutimiĝis pensi, ke paco eble neniam efektiviĝos inter la nacioj. Samtempe oni pensis, ke tria tutmonda milito ne plu povos okazi pro la ekzisto de la atom-armiloj. Tamen ni vivis sub la timo de konstante ebla atom-konflikto, kaj iom post iom konsciiĝis, ke tiu konflikto signifus teruran mondkatastrofon, eĉ eble la ĉeson de la vivo sur nia Tero. Multaj alvokoj aŭdiĝis el plej diversaj medioj, sed ilin la ŝtatestroj ne volis aŭskulti.

Tiam subite okazis la Kongo-revolucio. Malpleno ekzistis en riĉa regiono. Sin anoncis multaj helpemaj armeoj. Sed montriĝis, ke sub tiu helpo sin kaŝis antaŭ ĉio imperialismaj celoj. Montriĝis ankaŭ, ke neniuj ŝtato akceptus vidi alian ŝtaton okupi tiun mondparton. Tio estus rompo de la ekvilibro inter la naciaroj fortaj. La sekretario de UN tiam ludis gravan rolon. Pri ĝi ni jam detale parolis dum la pasintaj elsendoj. Li havis la kuraĝon alfronti la kritikojn el plej diversaj ŝtatestroj, kiuj lin minacis eĉ pri ne-reelekto. Povas esti, ke li entreprenis agadojn malgraŭ ne-ekzisto de agad-rajtoj. Sed li volis interveni kiel eble plej rapide en tiu mondparto, antaŭ ol la situacio fariĝus ankoraŭ pli grava. Inter disputantaj gigantoj homo staris, kaj diris ne al la perforto. Lia kuraĝo kondukis lin al morto, sed samtempe malpermesis mondkonflikton, kiu verŝajne estus kaŭzinta la morton de milionoj, se ne estas de miliardoj da homoj, vian morton, mian morton, karaj geaŭdantoj.

Permesu rakonton pri mia vilaĝo, kiu rilatas kun la morto de s-ro Hammarskjöld. Estis en aŭtuno 1961. La jarkongreso de Esperanto-Edukistaro de Svislando devis baldaŭ okazi ĉe ni. Jam ekde ses monatoj la programo de la du superaj klasoj de la vilaĝo estis dediĉita al rikolto de materialo por munti ekspozicion pri la temo *Esperanto en la lernejoj kaj Unuiĝinta Naciaro*. Mi ĉiam memoros la anoncon de la morto de s-ro H. fare de 12-jara knabo. « *Ĉu vi aŭdis per la radio*, li diris preskaŭ plorante, *s-ro H. mortis en aviadil-akcidento*. » Post lia diro ekregis emociiga silento, kaj mi konstatis, ke larmoj aperis ĉe multaj okuloj. La infanoj desegnis kronon kaj dank-vortojn ĉirkaŭ foto de s-ro H. Poste pli ol 500 vizitantoj staris antaŭ tiu bildo, kaj mi rimarkis, ke multaj el ili malfacile povis kaŝi sian emocion. Post la fermo de nia manifestacio mi rimarkis, ke la foto de s-ro Hammarskjöld estis makulita de larmoj.

Eble ne nur en La Sagne larmoj fluis je la anonco de tiu morto. Povas esti eĉ, ke subita emocio premis la koron de pli ol unu ŝtatestro. En silenta medito kelkaj verŝajne ekkomprenis, kiel ankaŭ ekkomprenis simplaj infanoj en svisa vilaĝo kaj vizitantoj de lerneja ekspozicio, ke la mondo nun formas tuton, kaj ke la epoko de la egoismaj naciismoj kaj de la perforto mortis. Ili ankaŭ komprenis, ke ni nepre devas, laŭ la ekzemplo de la ĝenerala sekretario de Unuiĝinta Naciaro, kuraĝe kontraŭstari la perfortemulojn.

Post tiu morto multaj atakoj kontraŭ Unuiĝinta Naciaro ĉesis. Malgraŭ minacoj kontraŭ la ekzisto de la funkcio mem de ĝenerala sekretario oni facile povis selekti anstataŭanton al s-ro H. Kaj la blasfema insulto, ke UN nur estas « Maŝino » ankaŭ subite ĉesis. Pli favora klimato naskiĝis. Ho, ne paca klimato, sed klimato, kiu denove permesis diskuton.

La Kongo-afero montris, ke la hodiaŭa ĥaosa mondo bezonegas mondregistaron kapabla solvi la internaciajn problemojn antaŭ ol ili estos tiel gravaj, ke nur tria tutmonda perforta konflikto sin prezentos por ilia solvo.

Tiu Kongio-konflikto ankaŭ montris, ke neperforta metodo pli fortas, ol perforta por la solvo de internaciaj konfliktoj. Mi menciis dum la aŭgustaj elsendoj, ke la UN-soldatoj ricevis la ordonon ne uzi siajn armilojn. En kelkaj okazoj ili devis tamen uzi perforton. Vi certe memoras la reagon de la gazetaro. Ŝajnis, ke la UN-armeo estis formita de banditoj. Ni facile forgesis, ke kutime niaj naciaj armeoj ne longe hezitis antaŭ ol uzi banditajn metodojn. Io ŝanĝiĝis. Subite ni vidas tuthome, do la mortigo de aliaj homoj ŝajnas al ni evitenda. Antaŭe ni vidis nur gente, kaj la mortigo de aliaj gentoj ŝajnis al ni normala.

La Kongo-revolucio kaj la morto de sinjoro Hammarskjöld subite malfermis la okulojn de multaj homoj. Pro tio en kelkaj jaroj la klimato inter la naciaj blokoj multe pliboniĝis, kaj la diskuto de reformoj de la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro povis rekomenci. Pri tio ni reparolos dum venonta elsendo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la Kongo-afero. Radio-Svislando diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-